

& Pigra Petro:

< Rekante 21 el 41 batoj por strofo, entute 1476 paŝoj dum 17 minutoj. Rusan popolan fabelon poemigis Julio Baghy (Ĉielarko, 1966). Baladigis Martin Strid (2017) per novaj melodio kaj rekantaĵo.>

(#Melodio:

<:41> (/mi so mimi rere dodo; SoSo MiSo dore mi re; mi so somi rere mido; somi rere doTi doLa;

(#Rekantaĵe: mi so mi reTi do La; SoSo MiSo dore mi re; mi so somi re mido; somi re doTi do La a;)

)×36)+

(&Strofoj:

'1 Petro estis grasa knabo ; kun pomvangoj, dika kapo; post satigo li senage ; ronke dormis nokte, tage.

(×:; **Alte saltas la tigro ; Mortmalsatus ĝi per pigro ; kaj ne saltus ĝi alte ; Alte saltas la tigro.**)

'2 Paĉja digno se admonis, ; panja mildo tuj oponis; ŝi ne ĉesis lin trovarti, ; eĉ de vento ŝirme gardi.

'3 Tiel kreskis li plenaĝa, ; sed tre pigra, ne tro saĝa; eĉ al manĝo li penpove ; trenis sin nur limakmove.

'4 Li altiĝis laŭ staturu ; kiel inter domoj – turo; lia fort ŝajnis bova, ; sed por la labor' senpova.

'5 Foje monon li bezonis, ; sed la patro ĝin ne donis; "Kiu volas grandsinjori, ; devas peni kaj labori.

'6 Eble scias vi, verŝajne, ; mono venas laborgajne; ; se ĝin havi vi ne penis, ; ĝi foriras kiel venis.

'7 Mi konsilas, rememoru, ; unu rublon perlaboru ; kaj mi tiam, ne plifruue, ; donos plio kontribue!"

'8 Petro pensis – aĥ, kruele! – ; kaj li kuris tuj ribele ; al la kara panjo plendi, ; helpon de ŝi nun pretendi.

'9 Kiel ĉiam, la patrino ; premis lin al sia sino ; kaj karesis, kisis multe: ; "Paĉjo agas iom stulte".

'10 Lin persvadi ŝi promesis, ; sed ĉi-foje ne sukcesis, ; ĉar la patro tre obstine ; tiel ŝin rifuzis fine:

'11 "Hej, virino kokin-mensa, ; tia amo senpripensa ; kovas en la knabo pekon! ; Mi ne donas eĉ kopekon".

'12 Kiel helpi, kion fari, ; patran spiton nun ripari? ; Panjakore ŝi cerbumis ; kaj planeton ekplenumis:

'13 "Ho, fileto, mia kara, ; paĉjo estas nun avara, ; sed ni povas saĝon uzi, ; lian volon superruzi.

'14 Jen mi ŝovas en poŝeton ; unurublan bankbileton; por ne fasti dum la tago, ; lardon havos vi en sako.

'15 Iru kampen nun libere ; kaj revenu nur vespere, ; al li donu tiun monon ; kaj postulu la aldonon!"

'16 Nu, al Petro la aranĝo ; plaĉis tre, do tuj post manĝo ; frumatene kampen iris, ; sin sub ombron li entiris.

'17 Tie dormis li trankvile ; dum la suno ardis brile; post kiam ĝi subeniris, ; ankaŭ li mem hejmeniris.

'18 Tuj la rublon li etendis ; al la patro kaj atendis ; je aldono promesita... ; Sed la patro restis spita.

'19 Li la rublon geste petis, ; poste ĝin en formon ĵetis, ; moke diris kun rigoro: ; "Ĝin vi gajnis sen laboro!"

'20 Kion fari? – Petro pensis, ; tagan dormon rekomencis, ; sed la panjo lin senbrue ; flustre vekis jam tre frue:

'21 "Jen, flieto, en poŝeto ; unurubla bankbileto; kuko, koko en pansako, ; ke ne grumblu la stomako.

'22 Sed nun zorgu dum reveno ; pri postsignoj de ŝvitpeno; certe ŝajnus tre utile, ; se vi ŝmirus vin argile..."

'23 Li do agis laŭ konsilo ; kaj sin ŝmiris per argilo; post tuttaga nenifaro ; li revenis de kamparo.

'24 Li la rublon tamen metis, ; ĝin la patro fajren ĵetis, ; ree mokis kun rigoro: ; "Ĝin vi gajnis sen laboro!"

'25 Kion fari?--- Ŝultrotire ; dormi iris li trankvile, sed lin dormo nun evitis, ; li pensadis kaj decidis.

'26 En krepuska horo frua ; ĉe kok-krio la unua, ; pigra Petro eĉ tre vigle ; al vilaĝo marŝis migre.

'27 Inter domoj li zigzagis, ; laborserĉe haltis, vagis; li balais straton, korton, ; sakportante streĉis forton,

'28 fosis, plantis en ĝardeno, ; ĉaron tiris kun ŝvitpeno, ; dek-kopeka kapitalon ; gajnis puriginte stalon.

'29 Cent kopekoj, unu rublo! ; Cent moneroj nur el kupro! ; Tamen ŝajnis orvalora ; sumo post la tag' labora.

'30 Li aspektis laca, vere; sed li tenis sin fiere: ; "Jen la rublo! Do kalkulu! ; Pri mi moke ne skrupulu!"

'31 Sed la patro tamen dubis, ; la monerojn ĵete ŝutis ; en la fornon kun rigoro: ; "Ĝin vi gajnis sen laboro!"

'32 Petro saltis post sekundo ; neatente pri brulvundo ; preni el la ardaĵ cindroj ; cent kopekojn per la fingroj.

'33 Dum pri tio li klopodis, ; patra ĝojo jen akplodis: ; Tiun rublon, nun mi vidas, ; por laboro vi meritias.

'34 La aldono ne forestos. ; Eĉ ni gaje kune festos. ; Vi fariĝos viro brava, ; devoscia, honesthava".

'35 Depost tiam – diro migras – ; pigra Petro ne plu pigras, ; sed volonte kun fervoro ; ĉiam pretas por laboro.

'36 Famo pri li eĉ asertas, ; kion li mem ĝoje spertas, ; ke post tiu grava ŝanĝo ; por li gustas pli – la manĝo.)